



LA MALBENO
DE TARUMO KAJ NURANA

J. M. PROGIANTE

ILUSTRAJOJ DE MARIANA HORTOLANI RODRIGUES



LA MALBENO DE TARUMO KAJ NURANA

J. M. PROGIANTE

ANTVERPENO
2020



The background of the page is a soft-focus, light green and yellow illustration of tropical plants, including palm fronds and large, heart-shaped leaves, creating a lush, natural atmosphere.

LA MALBENO DE TARUMO KAJ NURANA

J. M. PROGIANTE



ORIGINALA TITOLO: A MALDIÇÃO DE TARUMA E NURANA

ELPORTUGALIGIS: J. M. PROGIANTE

REVIZIO: PAULO SÉRGIO VIANA

KOVRILO KAJ ILUSTRAĴOJ: MARIANA HORTOLANI RODRIGUES

ENPAĜIGO: JOSÉ ROBERTO TENÓRIO

ESPERANTA ELDONO: ELDONEJO LIBERA


ISBN: 978-0-244-86850-5

MAVOMO ALVENAS



kiuj en la urbo parolis pri la universala kongreso de la internacia lingvo, kiu komenciĝos en tiu semajno. Multaj iris al la flughaveno kaj al la busa stacidomo por atendi kongresanojn, kiuj venis el la tuta mondo.

Ankaŭ Andreo estis en la stacidomo. Li estis dekdujaraĝa kaj li sciis paroli en la internacia lingvo, ĉar lia patro instruis ĝin al li kiam li estis tre malgranda. Kiam li lernis skribi li komencis korespondi per leteroj kun infanoj de aliaj landoj kaj unu el liaj korespondamikoj estis Mavomo, knabo samaĝa kiel li, kiu vivis en Zairio, granda lando en la centro de Afriko, kiu nuntempe nomiĝas Demokratia Respubliko Kongo.



Andreo atendis senpacience la buson en kiu veturis Mavomo kaj lia patro. Kiam la amiko skribis, ke li venos kun sia patro al la kongreso, Andreo entuziasmiĝis kaj konvinkis siajn gepatrojn gastigi ilin.

Fine alvenis la buso kaj el ĝi eliris viro kaj knabo, ambaŭ kun verda steleto sur la brusto. Andreo tuj alproksimiĝis kaj kriis:

— Mavomo! Vi estas Mavomo, ĉu ne? Mi estas Andreo.

Jes, li estis Mavomo.


— Andreo! — li diris, kun gaja rideto.

Ili brakumis unu la alian kaj Mavomo prezentis sian patron al Andreo.

— Venu kun mi al mia domo, — diris Andreo. — Certe vi estas lacaj. Mi havas monon por pagi taksion. Mia patrino atendas nin kun bongusta lunĉo.

Fakte la vizitantoj estis tre lacaj pro la longa vojaĝo. Ili dankis multe kaj sekvis Andreon de proksime, por ne perdiĝi en la homamaso.





Subite, kiam ili jam estis apud la taksio, Mavomo haltis kaj rigardis alian aŭtomobilon, kiu en tiu momento ekmoviĝis por eliri el la stacidomo.

— Kio okazas? — demandis Andreo.

— Kiel strange... — diris Mavomo. — Tiu junulo, en tiu taksio... Ŝajnas, ke mi konas lin.

Lia patro ridis kaj komentis:

— Nu, mia filo, tio neblas, ni ĵus alvenis. Mi pensas, ke vi legis multajn krimromanojn en la aviadilo.

Ankaŭ Andreo ridis. Tamen Mavomo restis serioza kaj silenta dum kelkaj minutoj, streĉante sian memoron. Poste li komencis observi la urbon tra la fenestro de la taksio kaj ne plu pensis pri tio.

LA DONACO

En la domo de Andreo la tablo jam estis preta por la lunĉo kiam ili alvenis. Mavomo ŝategis panon kun fromaĝo kaj gujavan marmeladon.

Dum la lunĉo Andreo demandis ilin pri la vojaĝo. Mavomo volis rakonti ĉion.

— Mia patro sentis iom da timo en la aviadilo. Ankaŭ mi timetis, sed nur en la komenco, kiam ni ankoraŭ superflugis la ĝangalon. Kiam la aviadilo atingis la Atlantikon mi jam estis trankvila. La tuta vojaĝo ĝis San-Paŭlo daŭris proksimume ok horojn.

Mavomo rakontis aliajn aferojn pri la vojaĝo. Li diris, ke la piloto permesis al li eniri la stirejon de la aviadilo.

Andreo aŭdis ĉion tre atente kaj komentis:

— Kia aventuro, Mavomo! Mi ŝatus vojaĝi eksterlanden, sed mia patro diras, ke tio estas tre multekosta.

— Estas vere, — konfirmis la patro de Mavomo. — La flugbiletoj estas multekostaj. Ni venis ĉar la membroj de la klubo de Nico helpis nin.

Andreo sciis, ke ili estas malriĉaj kaj ricevis apogon por partopreni en la kongreso, sed li volis koni pliajn detalojn pri tiu helpo.

Mavomo antaŭiĝis al sia patro kaj klarigis:

— Vi scias, ke Afriko estas kontinento kun multaj problemoj. La unuaj grupoj kiuj formiĝis tie por studi la internacian lingvon ne havis sufiĉajn rimedojn, pro tio kelkaj kluboj de riĉaj landoj decidis helpi ilin per ĝemelaj kluboj. Mi kaj mia patro partoprenas en la klubo de Kinŝaso, la ĉefurbo de

nia lando. Nia ĝemela klubo situas en la urbo Nico, en Francio. Ili sendas al ni librojn, magazinojn kaj flugbiletojn por ke ni povu partopreni en internaciaj kongresoj, kiel tiu, kiu okazos en via urbo.

Andreo intencis fari pliajn demandojn, tamen lia patrino rimarkigis, ke la gastoj bezonas ripozon.

— Vi pravas, panjo. Jam estas preskaŭ la kvara, kaj je la oka ni devos esti en la Universitato, por ĉeesti la malfermon de la kongreso. Ni havos tutan semajnon por konversacii. Restu laŭvole. Dum vi ripozos, mi vidos, ĉu mia patro bezonas mian helpon. Ekde la mateno li laboras en la akceptado de la kongresanoj.

Antaŭ ol Andreo eliris, Mavomo eliris paketon el sia valizo kaj donis al li.

— Jen donaceto por vi, Andreo.

— Dankon, Mavomo.

Andreo tuj malfermis la pakon kaj alvokis sian patrinon:



— Panjo, venu vidi. Mavomo alportis donacon al mi. Ĝi estas ligna statuo, tre bela! Dankon, Mavomo.

— Tio estas totemo, — diris Mavomo. — Tiu objekto restis kun mia familio dum longa tempo. Mi kunportis ĝin, ĉar mi pensas, ke ĝi apartenas pli al vi, ol al mi.

— Ĉu? Kial? — demandis Andreo, surprizita.

Mavomo ridetis kaj klarigis:

— Mia praavo diris, ke indiĝenoj de Sud-Ameriko skulptis tiun statuon, sed neniuj scias, kiu transportis ĝin en Afrikon.

— Hm! Interese! Ĉu ĝi alportas bonŝancon? — demandis Andreo.

— Mi ne scias. Mia praavo diris, ke ĝi estas neŭtrala objekto, ĉar ĝi ne estas kompleta.

Andreo turnis kaj returnis la objekton, serĉante ian difekton.

— Mi ne komprenas, — li diris. — Kial ĝi ne estas kompleta? Ŝajne ĝi estas perfekta.


— Ankaŭ tion mi ne scias, — respondis Mavomo, balancante la kapon. — Mia praavo ne diris la tuton. Li estas tre maljuna kaj ne ŝatas paroli multe. Tamen, tio ne gravas, ĉu ne? Feliĉe ĝi alvenis sendifekta, ĉar ĝi preskaŭ rompiĝis dum la vojaĝo.

— Ĉu?!

— Mi forgesis rakonti ion al vi, — daŭrigis Mavomo. — En la flughaveno, mi devis malpaki la totemon por montri ĝin al doganisto. Poste, en la busa stacidomo de San-Paŭlo, kiam mi repakis ĝin, juna viro senintence puŝis min, kaj la totemo falis.

— Feliĉe ĝi ne rompiĝis, — komentis Andreo, fikse rigardante la okulojn de la totemo.

— Jes, sed ne nur tio okazis, Andreo. Tiu junulo, kiu ŝajnis al mi indiano, estis tre mirigita. Li rigardis la totemon per fiksjaj okuloj, kiel vi faras nun, kaj poste foriris en silento. Mi havis la impreson, kvazaŭ li volas forporti ĝin.



— Povas esti, — diris Andreo. — Mi pensas, ke ĉiu ajn ŝatus fari tion. Ĝi estas unika objekto. Ĝiaj okuloj estas belaj, misteraj... Mia volo estas rigardadi ilin.

Mavomo petis permeson ripozi. Post lia foriro, Andreo restis ankoraŭ iom da tempo kun la donaco en la manoj. Li imagis la misterojn kaŝitajn en tiu ligna figuro. Fine lia patrino venigis lin en la realan mondon:

— Andreo! Ĉu vi ne diris, ke vi helpos vian patron?

— Jes ja... — li diris, kaj kuris al la strato.




MISTERA MALAPERO

En la sekva tago, Andreo kaj Mavomo iris frumatene al la Universitato. Tie ili trovis amason da homoj, kiuj partoprenos en la programeroj de la unua tago de la kongreso.

Andreo kondukis la amikon tra la ĝardeno de la Universitato, ĝis la loko kie okazos la kongreso de la infanoj.

Tie la organizantoj formis diversajn grupojn por la kulturaj, artaj kaj sportaj aktivecoj de la semajno. Andreo kaj Mavomo volis resti en la sama teamo kaj al ili kuniĝis du knabinoj kaj unu knabo: Hua, Roza kaj Eriko.



En la fino de la unua tago la kvin infanoj jam estis grandaj amikoj. Tiam Andreo faris inviton al ili:

— Ni iru al mia domo. Mi volas prezenti vin al miaj gepatroj. Poste ni promenos tra la urbo.

Ĉiuj akceptis la proponon kun entuziasmo.

Survoje Andreo rakontis al ili pri la totemo. Hua multe interesiĝis kaj diris, ke ŝi volas vidi ĝin.

Eriko rimarkis, ke aliaj personoj rigardas ilin kun scivolemo.

— Kompreneble, — komentis Roza —, ne ĉiutage oni vidas ĉininon, aŭstralianinon, brazilanon, zairanon kaj svedon kune, kaj, plie, parolantajn la saman lingvon.

— Estas vere, — konsentis la aliaj, ridante.

En la domo de Andreo, post duonhora, Hua memoris pri io:

— La totemon, Andreo! Ni volas vidi ĝin.

— Ha! jes, pardonu min, — diris Andreo. — Atendu iomete.

Post kelkaj sekundoj li revenis, kun maltrankvila mieno.

— Ĝi ne plu estas tie, kie mi lasis ĝin. Estas strange, ĉar neniuj prenas miajn aĵojn... Panjo, ĉu vi scias, kie estas la totemo?

— Ne, mia filo. Kiam mi eniris vian ĉambron la lastan fojon, post la tagmanĝo, ĝi estis tie. Kaj nur mi restis hejme la tutan tagon.

La fakto estis, ke iu eniris la ĉambron de Andreo kaj forprenis la totemon. Kiu? Kial?

Tiuj demandoj ŝvebis inter Andreo kaj liaj amikoj, kiel veraj enigmoj. Ili decidis ĉion fari por trovi la respondojn.



ĈU IU VIDIS ERIKON?

En la sekva tago, Andreo estis tiel malĝoja pro la malapero de la totemo, ke li ne volis partopreni en la ekskurso de la infanoj. Tamen lia patro kaj Mavomo konvinkis lin iri.

Du busoj eliris el la Universitato, je la oka, direkte al la Kultura Centro. Poste ili vizitos la Muzeon kaj vespere la Astronomian Observatorion.

La amikoj de Andreo faris ĉion eblan por ke li forgesu la malaperon de la totemo kaj partoprenu en la komuna ĝojo, tamen li ne sukcesis pensi pri alia afero.

— Ve, Mavomo, tio ne devus okazi, — li diris. — Ĝi estas valorega objekto. Kial mi ne enŝlosis ĝin en la vestŝranko?

Mavomo provis konsoli lin:

— Vi ne kulpas. Ĝi ankoraŭ reaperos.

— Mavomo pravas, Andreo, — konfirmis la eta Roza. — La ŝtelisto redonos ĝin. Vi diris, ke la totemo ne estas objekto de materiala valoro. Nur oro, arĝento, mono interesas ŝtelistojn.

— Se estas tiel, kial oni forportis ĝin? — rediris Andreo, kun la kapo klinita kaj apogante la mentonon sur la mano.

Eriko miksiĝis en la konversacion kaj proponis klarigon:

— Pro malboneco. En la tuta mondo estas malbonuloj. La ŝtelisto eniris la ĉambron por serĉi monon kaj juvelojn. Ĉar li ne trovis tion, li forportis la totemon, nur pro malboneco.

— Kaj vi, Hua? Kion vi opinias?

Hua rektiĝis sur la benko, direktis al ili siajn etajn kaj brilajn okulojn, kaj parolis, tre mallaŭte:

— Ekde hieraŭ mi pensas pri tiu afero. Mi konkludas, ke ne temas pri ordinara ŝtelisto...

— Kial?! — ĉiuj demandis samtempe, alproksimiĝante por pli bone aŭdi ŝin.

— Estas simple, — ŝi respondis. — Ŝtelistoj ne lasus ĉion en ordo antaŭ ol foriri. Krome estas alia grava detalo...

— Kiu detalo?!


Tiam ĉiuj estis tre proksimaj al Hua, ardantaj de scivolemo.

— Tiu detalo pruvas, ke iu eniris la ĉambron de Andreo nur por preni la totemon.

— Kaj kiu estas tiu detalo? — ĉiuj ripetis.

— Nu, — konkludis Hua, — nur blinda ŝtelisto ne trovas la valoran juvelujon, kiu estis tie, je malpli ol unu metro de la totemo.

— Pri kiu juvelujo vi parolas, Hua? — ekkriis Andreo, disrevita. — Verŝajne vi songis pri tio. La nura juvelo, kiun ni



havas, estas kolringo de mia patrino, kaj ĝi sidas en ŝia dormoĉambro.

Tamen Hua ne cedis:

— Mi estas certa, ke estis juvelujo apud la totemo, sur la sama breto. Mi vidis ĝin hieraŭ, kiam via patrino kondukis min tien. Ŝi montris al mi pentraĵon kun ĉina surskribo kaj petis, ke mi traduku ĝin. Mi estas certa, ke tio ne estis songo, Andreo.

Eriko, Mavomo kaj Roza turnis sin al Andreo, kun demanda mieno.

— Mi ankoraŭ pensas, ke Hua vidis alian objekton, — li diris. — Neniam ni havis juvelujon.

— Tio estis juvelujo, — insistis Hua, kuntiriĝante, iom kolereta. — Mi ne mensogas.

En tiu momento la gvidanto de la ekskurso anoncis, ke ili alvenis en la Kultura Centro.

Andreo eliris rapide el la buso kaj kaŝe malproksimiĝis de

la grupo. Post kelkaj minutoj li revenis, kurante kaj anhelante. Li alparolis Huan:

— Pardonu min, Hua. Vi pravas. Mi ĵus telefonis al mia domo. Mia patrino iris en mian ĉambron kaj trovis juvelujon. En ĝi estas kelkaj koloraj ŝtonoj, ŝajne multevaloraj. Ŝi estas terurita.


Hua akceptis la senkulpigon.

La apero de tiu juvelujo estis nova enigmo, kaj ili bezonis agi kune por solvi ĝin.

Mavomo vidis, ke la aliaj kongresanoj jam komencis viziti la departementojn de la Kultura Centro. Pro tio li proponis:

— Ankaŭ ni eniru. Poste ni povos ekzameni la juvelujon kaj eble trovi en ĝi ian spuron.

— Mi konsentas, — diris Roza, antaŭirante la aliajn.



Kiam la vizito en la Kultura Centro finiĝis, ili ekveturis al la Muzeo. Eriko ne ĉeestis, kaj la aliaj pensis, ke li malfruiĝis kaj estas en la alia buso, kiu venis malantaŭe.

Tamen, kiam ili alvenis en la Muzeo, ili konstatis, ke Eriko ne venis en la alia buso.

Roza memoris, ke ŝi vidis lin lastfoje en la biblioteko de la Kultura Centro. Poste li ne plu kuniĝis kun la grupo.

Afliktitaj, ili pridemandis la aliajn ekskursantojn pri la amiko, sed neniu sciis kie li estas. Tiam Andreo ne plu detenis sin kaj ekkriis eksplode:

— Plia mistero! Ĉu la foresto de Eriko estas ligita kun la aliaj faktoj? La totemo, la juvelujo, nun Eriko... Finfine, kio estas malantaŭ tio?



LA STATUETO

La respondeculo pri la ekskurso diris, ke ili povos reveni al la Kultura Centro nur post unu horo, kiam finiĝos la vizito en la Muzeo.

La kvar amikoj kunsidis rapide por decidi kion fari. Ili havis du alternativojn: rezigni pri la vizito en la Muzeo kaj reveni tuj al la Kultura Centro por serĉi Erikon, aŭ atendi ĝis la fino de la ekskurso.

— Vi decidu, — petis Andreo. — Se ni revenos nun, mi perdos nenion, ĉar mi jam konas la Muzeon, sed vi ne.

Mavomo vidis, ke Hua kaj Roza estas sendecidaj, do li proponis:

— Io diras al mi, ke Eriko bonstatas, kaj ke ni devas eniri.

La konvinkiĝo de Mavomo trankviligis la aliajn. Post kelkaj minutoj ili estis en la interno de la Muzeo.

Neniu el ili povus imagi tion, kio okazos tie, preskaŭ en la horo de foriro.

En la Muzeo estis granda ejo kun ekspozicio pri indiĝenaj kulturaĵoj, kiel armiloj, domaj uzaĵoj, ornamaj kaj religiaj objektoj. Tie Mavomo sentis sin altirita de ligna statueto, proksimume kvin centimetrojn alta. Li sentis frostotremon kiam li ekzamenis ĝin pli atente. Li delasis ĝin kaj kuris tra la koridoroj, serĉante la aliajn.

— Andreo! Hua! Roza! Venu vidi, kion mi trovis.

Ĉiuj tri miris, kiam ili vidis Mavomon. Li estis pala kiel kreto.

Li diris nenion pli. Li nur kondukis ilin al la statueto kaj montris ĝin al Andreo, kiu ne povis reteni ekkrion:

— Estas nekredeble!

Hua kaj Roza ne komprenis, kio okazas, do Andreo klarigis al ili, ke tiu statueto estas perfekta kopio de la totemo, kiu malaperis el lia domo.

— Perfekta ne, Andreo, — korektis Mavomo. — Rigardu pli bone kaj vi rimarkos diferencon.

Andreo ekzamenis ĝin denove, pli zorge.


— Vi pravas, Mavomo. La okuloj... Ili estas iom longformaj. La okuloj de la totemo estas pli rondaj.

Roza proponis klarigon:

— Devas ekzisti miloj da totemoj en la mondo, multaj el ili egalaj aŭ similaj inter si. Eble la simileco de ĉi tiu statueto kun la totemo estas nur hazarda.

Andreo kaj Mavomo kapneis. Ili ne aprobis tiun ideon.

— Vi diras tion, ĉar vi ne vidis la totemon, — diris Andreo.



— La simileco estas tro granda. Estas neeble, ke tiom da detaloj estas egalaj nur hazarde. Vidu kiel ellaborita ĝi estas.

Hua, kiu ĝis tiam restis silenta, decidis diri, kion ŝi pensas:

— Laŭ tio, kion vi diras, ni estas en grava momento de nia kazo. Mi opinias, ke ni devas scii ĉion eblan pri ĉi tiu statueto.

Ĉiuj konsentis kun Hua. Tamen ili havis alian problemon por solvi. La ekskurso jam finiĝis kaj Eriko ankoraŭ ne reaperis.

Ili decidis dividi sin en du grupojn. Roza kaj Mavomo revenos al la Kultura Centro, kie ili vidis Erikon lastfoje, dum Hua kaj Andreo restos en la Muzeo por serĉi pliajn informojn pri la statueto.

La murhorloĝo de la Muzeo batis la dekan kaj duonon. Ili interkonsentis renkontiĝon je la tagmezo, en la domo de Andreo.






KIEL DEĈIFRI TIUN SURSKRIBON?

Andreo kaj Hua renkontis virinon, kiu laboris en la Muzeo, kaj petis de ŝi informojn pri la statueto. Ili tiel insistis, ke ŝi kondukis ilin en la ĉambrom de la direktoro, Prof-o Gabrielo. La infanoj eĉ timis riproĉon, sed la direktoro ĝojiĝis, kiam li vidis, ke la infanoj estas interesataj pri tiu objekto.

Li metis la statueton sur la tablon kaj komencis paroli:

— Mi rakontos al vi ĉion, kion mi scias pri ĉi tiu peco. Ĝis ok jaroj antaŭe ni havis en la Muzeo tre antikvan totemon, kiu en la pasinteco apartenis al indiĝena tribo de la nacio Bororo. Tiu tribo, kiel multaj aliaj de Brazilo, preskaŭ estingiĝis proksimume



antaŭ ducent jaroj. Oni supozas, ke blankaj esploristoj alportis malsanon, kiu kaŭzis la morton de la indiĝenoj.

Andreo aŭdis lin atente kaj tradukis al Hua. Ili ne volis perdi eĉ unu vorton de la klarigo.

La profesoro daŭrigis:

— Restas malmultaj membroj de tiu tribo. Kvankam ili vivas en urboj, ili provas konservi siajn tradicon. Dum longa tempo ili luktis por repreni la totemon, kiu estis en la Muzeo. Fine okazis akordo pri interŝanĝo, antaŭ ok jaroj. La indiĝenoj forportis la totemon kaj donacis ĝian miniaturon al la Muzeo. Tiu miniaturo estas ĉi tiu statueto.

En tiu momento la direktoro prenis la statueton kaj faris ion, kio surprizis Andreon kaj Huan. Li malfermis la objekton je ĝia mezo kaj eltiris el ĝia interno tabuleton kun stranga surskribo.

— Ĉu vi vidas? — li diris. — Eĉ ĉi tion ili zorge kopiis. La originala totemo havas aperturon kaj tabuleton egalan al ĉi tiu.

— Kaj kion diras tiu surskribo? — demandis Andreo.

— Mi ne scias, — respondis Prof-o Gabrielo. — Ni eĉ ne sciis, ke estis tio ene de la totemo, antaŭ ol la indiĝenoj venis preni ĝin. Ili diris, ke temas pri malbeno, sed ili ne volis deĉifri ĝin por ni.


Andreo kaj Hua tremis, kiam ili aŭdis tiujn vortojn, sed malgraŭ tio ili volis scii pli.

— Ni faris kelkajn esplorojn, sed sen sukceso. Ni scias nur, ke tiu mesaĝo ne estas skribita en lingvo parolata de indiĝenoj de Brazilo. Tio estas ĉio, kion mi povas diri al vi.

— Ni tre dankas vian atenton, s-ro direktoro. Estus interese, se ni povus konversacii kun iu indiĝeno de la tribo, al kiu apartenas la totemo. Ĉu ili loĝas en ĉi tiu urbo?

— Eble jes, sed bedaŭrinde mi ne povas respondi kun certeco. De longe mi ne vidas ilin.

Hua memoris, ke unu el la kongresanoj estas fama lingvisto, kiu eble povus helpi ilin interpreti tiun misteran tekston. Ŝi flustris tion al Andreo, kiu petis permeson kopii la surskribon.



La direktoro jesis, sed demandis, kial ili interesiĝis pri la statueto.

Andreo decidis respondi per mensogeto, por eviti pliaj demandojn:

— Ni bezonas tiujn informojn por prezenti en kultura konkurso, kiu okazas en la kongreso. Vi scias pri la kongreso, ĉu ne?

— Certe, — respondis la direktoro. — Ĉiuj scias pri ĝi. Do bonan kongreson al vi!

Ili denove dankis kaj eliris rapide por renkonti Mavomon kaj Rozan.

Survoje, Hua komentis:


— Mi pensas, ke se D-ro Lazlo sukcesos deĉifri ĉi tiun tekston, ni solvos nian misteron, Andreo.

— Tion mi esperas, Hua. Vidu, jam estas preskaŭ la tagmezo. Ĉu Mavomo kaj Roza trovis Erikon? Ni iru al mia domo. Alia enigmo atendas nin tie, la juvelujo, ĉu vi memoras?

KUN D-RO LAZLO

om post la tagmezo, la kvar amikoj jam estis en la domo de Andreo, admirante la juvelujon kaj ĝiajn belegajn gemojn.

La patrino de Andreo devis insisti multe por konvinki ilin tagmanĝi, ĉar ili estis maltrankvilaj pro pluraj aferoj: Eriko ankoraŭ ne reaperis; ili ne komprenis, kial iu nekonato forportis la totemon kaj lasis en ĝia loko tiel valoran objekton; kaj ili havis en siaj manoj la tekston pri malbena, kiun ili ne kapablis traduki.



Ili espero estis D-ro Lazlo, hungara saĝulo, fama fakulo pri antikvaj lingvoj.

— Mi scias, kie trovi lin, — informis Hua. — Mi kaj li estas en la sama hotelo. Ni devas iri rapide, ĉar li faros prelegon baldaŭ, je la dua horo.

Ili eĉ ne atendis la deserton. Post dek kvin minutoj ili estis ĉe la pordo de D-ro Lazlo.

La saĝulo akceptis ilin kun ĝojo, kvankam li estis iom dormema. Andreo rapide klarigis la motivon de la vizito kaj transdonis al li la kopion de la skribaĵo trovita en la statueto.

— Ni vidu, kio estas tio, — diris la doktoro, surmetante siajn okulvitrojn. — Hm, tre interesa afero! La literoj estas iom strangaj, kvazaŭ desegnitaj de homo, kiu ne bone konas la lingvon. Malgraŭ tio eblas rekoni, ke temas pri teksto skribita en lingvo de la mongola grupo. Kie vi trovis tion? Tiu skribaĵo estas tre interesa. Kial vi volas traduki ĝin?

La kvar infanoj interrigardis sin, pensante: “Ĉu ni devas diri la veron?”

Per kaŝa gesto, Hua petis ilin lasi ŝin respondi:

— Ni trovis tiun tekston en indiĝena objekto, en la Muzeo — ŝi diris.

Tio sufiĉis. D-ro Lazlo ŝajne forgesis sian propran demandon.

— Bone, — li diris, oscedante, — mi bezonas iom da tempo por traduki ĝin komplete. Do revenu morgaŭ, ĉio bone?

Ili afliktiĝis.

— Ĉu ne estas eble, ke vi faru la tradukon nun? — demandis Andreo, per petega voĉo.

Roza plifortigis la peton:

— Bonvolu fari tion por ni, D-ro Lazlo. Ni fakte bezonas la tradukon ankoraŭ hodiaŭ.

Tuj poste estis la vico de Mavomo paroli:



— Tiu traduko estas tre grava por ni.

Poste Hua:

— Jes, doktoro, vi eĉ ne povas imagi, kiom grava tio estas.

Tiu urĝeco ŝajnis iom stranga al la eminenta lingvisto, sed li memoris, ke ankaŭ li havas urĝon, kaj decidis ne plilongigi la aferon.

— Bone, infanoj, verŝajne vi estas decidintaj ne foriri sen la traduko, ĉu ne? Do mi vidu, kion mi povas fari.

Ili ĝojegis.

Post dudek minutoj de atenta legado kaj pluraj notoj, D-ro Lazlo stariĝis kaj alproksimiĝis al la infanoj, kiuj atendis lin kun granda scivolo.

— Aŭdu, — li diris.

Kaj, per basa kaj malrapida voĉo, li rivelis la sekreton de la totemo:


— Jen kion diras la teksto: “Blankhaŭta viro forportis hodiaŭ la vivon de nia tribo. Kune kun ĝi, li kunportis sian propran malbenon, kiu daŭros ĝis la sekvanta kiso de Tarumo kaj Nurana. En tiu tago, Ari kaj Meri estos ripozantaj. Tarumo venos per la manoj de filo de blankhaŭtaj homoj, kies haroj estas el oro, kaj kiu loĝas tie, kie Meri ne ripozas. Nurana venos per la manoj de knabino de etaj piedoj”. Ĉu vi ŝatis? — diris li, je la fino, rigardante la infanojn de sur la okulvitroj.

Ŝajne la kvar infanoj komprenis preskaŭ neniom.

— Laŭ mia opinio nenio ŝanĝiĝis, — diris Roza, farante grimacon.

Antaŭ ol ili demandis ion, D-ro Lazlo malfermis la pordon kaj ĝentile invitis ilin eliri.

— Pardonu min, infanoj, sed mi ne volas malfruiĝi al la konferenco. La plej malfacila parto estas farita. Mi kredas, ke vi



mem povos kompreni la reston, se vi faros kelkajn esplorojn. Se vi ne sukcesos, revenu morgaŭ. Kun plezuro mi helpos vin.

Ili jam estis ĉe la pordo de la hotelo, kiam li finis paroli. Taksio atendis lin.

Kiam li jam estis en la aŭtomobilo, Hua faris ankoraŭ plian demandon:

— Laŭ via opinio, kie ni devas esplori?

— Mitologio, mia filino. Prenu libron pri mitologio kaj amuziĝu. Ĝis!

La taksio malproksimiĝis kaj la kvaropo restis tie, sur la trotuaro, rigardante la duondeĉifritan tekston.

— Ni ne perdu tempon, — diris Hua. — La sekva paŝo estas trovi libron pri mitologio.

LA PLANO

li trovis vortaron pri mitologio en la biblioteko de najbara lernejo.

Hua tralegis la tekston kaj diktis al Andreo la kvar vortojn, kies signifon ili ne konis: Tarumo, Nurana, Ari kaj Meri.

— Tarumo, Tarumo... En la vortaro ne estas tiu vorto. Ankaŭ Nurana ne estas. Ni serĉu la vorton Ari. Jen ĝi! En la lingvo de la bororoj, Ari estas la luno.

— Nun Meri...



— Meri... Mi trovis. Meri estas la suno.

— Do, — diris Mavomo, — ni anstataŭigu en la teksto Ari kaj Meri per luno kaj suno, kaj ni vidu la rezulton: “Blankhaŭta viro forportis hodiaŭ la vivon de nia tribo. Kune kun ĝi, li kunportis sian propran malbenon, kiu daŭros ĝis la sekvanta kiso de Tarumo kaj Nurana. En tiu tago, la luno kaj la suno estos ripozantaj. Tarumo venos per la manoj de filo de blankhaŭtaj homoj, kies haroj estas el oro, kaj kiu loĝas tie, kie la suno ne ripozas. Nurana venos per la manoj de knabino de etaj piedoj”.

Dum Mavomo legis, Hua alproksimiĝis al unu el la fenestroj de la biblioteko.

— Mi pensas, ke ie sube estas iu, kiu volas fini tiun malbenon — ŝi diris, distirante la kurtenojn kaj rigardante la urbon.

— Kial vi pensas tiel, Hua? — iu demandis

Hua metis sin inter ili kaj klarigis:

— Pensu kun mi. Tarumo kaj Nurana ne estas en la vortaro

pri mitologio, eble pro tio, ke ili estas propraj nomoj, de iuj aŭ ioj. Ni supozu, ke Tarumo kaj Nurana estas du totemoj...

— Do vi volas diri...?

— Jes, Andreo, kial ne? Eble mi eraras, tamen ni devas ekiri de iu punkto.


Mavomo kaj Roza diris, ke ili ankoraŭ ne komprenas la ideon de Hua.

— Trankviliĝu kaj cerbumu kun mi. Ni supozu, kiel mi diris, ke Tarumo kaj Nurana estas la du totemoj: unu, kiu malaperis el la domo de Andreo, kaj alia, tre simila, kiu estis en la Muzeo kaj nun estas kun la indiĝenoj. Kio okazus, se ili kiskus unu la alian?

— La malbeno ĉesus.

— Jes, Roza, tamen tiu kiso devas okazi sub kelkaj kondiĉoj. Ekzemple: la suno kaj la luno devas esti ripozantaj.

— Tio signifas, ke nek la suno nek la luno devas esti sur la ĉielo, aŭ pli bone dirite, ili ne devas esti videblaj.



— Ĝuste, Andreo, — konfirmis Hua. — Sed la plej grava kondiĉo estas la sekvanta.

— Ĉu vi parolas pri la filo de blankhaŭtaj homoj, kies haroj estas el oro, kaj kiu loĝas tie, kie la suno ne ripozas, kaj pri la knabino de etaj piedoj? — demandis Mavomo.

— Jes. Kaj ĉu ekzistas loko, kie la suno ne ripozas, tio estas, kie ĝi ne subiras?

— En la polusaj regionoj, dum la somero.

— Trafe, Roza. Kaj ankaŭ en la regionoj pli proksimaj al la polusoj. Ĉu vi neniam aŭdis pri la noktomeza suno?

— Eriko! — ekkriis Andreo, fine komprenante la dedukton de Hua. — Eriko estas blonda kaj loĝas tie, kie la suno ne sin kaŝas. En Svedio okazas tiu fenomeno de noktomeza suno. Pro tio oni kaptis lin.

— Do mankas nur la knabino de etaj piedoj — konkludis Mavomo, rigardante la piedojn de Roza.

— Ne rigardu min, — diris ŝi, per tremanta voĉo.

— Ne zorgu pri tio, Roza. Mi estas la knabino de etaj piedoj.

— Vi?!

— Jes, — diris Hua, — kaj ne valoras mezuri niajn piedojn. Memoru, ke Roza estas du jarojn pli juna ol mi. Eĉ se ŝiaj piedoj estus pli grandaj, mi ankoraŭ estus la knabino de etaj piedoj.

— Klarigu tion, Hua — petis Mavomo.

— Okazas, ke iam, en mia lando, ekzistis la kutimo devigi la knabinojn uzi mallarĝajn ŝuojn, por ke iliaj piedoj ne kresku multe.

— Kia kruelaĵo! — komentis Roza, hororigita.

Andreo rimarkigis, ke en la historio de ĉiuj landoj estas registroj de malbonaĵoj faritaj kontraŭ infanoj.

— Kiel vi vidas, — diris Hua, — verŝajne oni volas kapti ankaŭ min.



Roza volis avizi la policon por eviti la rabon de Hua, sed Andreo rifuzis tiun proponon.

— Mi pensas, ke ni ne devas meti la policon en ĉi tiun aferon — li diris. — La kaptintoj de Eriko povus fari ion kontraŭ li pro venĝo. Ni mem devas trovi Erikon.

Kaj antaŭ ol ili demandis “kiel?”, Andreo prezentis sian planon:

— Hodiaŭ vespere, dum nia vizito al la Observatorio, Hua apartiĝos de ni, sed ŝi restos sub niaj okuloj. Se la kaptintoj de Eriko estos tie, kaj vidos, ke ŝi estas senprotekta, certe ili ne perdos la okazon kapti ankaŭ ŝin. Se tio okazos ni sekvos ilin ĝis ilia kaŝejo. Kompreneble ĉio dependas, ĉu Hua volas aŭ ne servi kiel logaĵo por la rabistoj.

— Se tio dependas nur de mi, do la afero estas solvita. Ni metu en praktikon la planon de Andreo.

— Brave! — ĉiuj kriis, aplaŭdante la kuraĝon de Hua kaj eĉ forgesante, ke ili estas en biblioteko.




LA RABO

Tuj kiam ili alvenis en la Observatorio, Hua apartiĝis de la grupo, laŭ la difinita plano. Andreo, Mavomo kaj Roza rigardis atente ĉiujn personojn, kiuj alproksimiĝis al ŝi.

Subite junulo eniris kaj kaŝe ĉirkaŭrigardis la salonon, kvazaŭ li serĉas iun.

— Estas li, estas li! — flustris Mavomo, montrante lin per la fingro. — Li estas la indiano, kiu kunpuŝiĝis kun mi en San-Paŭlo. Sed kion li faras ĉi tie?



La respondo venis rapide. La junulo alpaŝis al Hua kaj donis al ŝi papereton. La knabino legis ĝin kun serioza mieno. Post kelkaj sekundoj da hezito, ŝi decidis akompani lin. Antaŭ ol eliri, ŝi turnis sin al siaj amikoj kaj palpebrumis per la maldekstra okulo.

— Jen la planita signalo! — diris Andreo. — Li mordis la hokon. Ni iru rapide por sekvi ilin.

Hua kaj la junulo eliris el la Observatorio kaj paŝis ĝis senhoma strato, kie ili haltis apud malnova kamioneto. Li malfermis la pordon por ŝi, sed antaŭ ol eniri Hua malleviĝis kaj demetis unu el la ŝuoj, ŝajnigante, ke io vundas ŝian piedon.

— Vidu, — diris Andreo. — Ŝi provas gajni tempon, por ke ni atingu la kargujon de la kamioneto. Se ni paŝos laŭ tiu malluma flanko de la trotuaro, ni alvenos tien sen ke li vidu nin. Ni devas iri tre rapide.

Ili retenis la spiron kaj paŝis piedpinte ĉe la muroj de la domoj, ĝis la veturilo.

Kiam Hua rimarkis, ke la triopo jam estas en la mallantaŭa parto de la kamioneto, ŝi surmetis la ŝuon kaj sidiĝis apud la mistera junulo, kiu tuj ekveturis.


Sur la kargujo la infanoj sin kaŝis sub nigra maldika tolo. Andreo palpis en la mallumo kaj trovis ŝnuron kaj ferstangon. “Tiu ajtoj povos esti utilaj”, li pensis.

La veturado daŭris duonhoron. Kiam la kamioneto haltis, ili estis ekster la urbo. La nura lumo venis el ligna dometo, je kvindek metroj de tie.

La indiĝeno eliris el la kamioneto. En tiu momento, Andreo faris al Mavomo antaŭdifinitan signalon kaj ambaŭ saltis sur lin. Antaŭ ol la junulo povis reagi, la knaboj kovris lin per la malhela tolo kaj forte ligis lin per la ŝnuro.

— Restu kvieta, kontraŭe ni sendos vin al la alia mondo! — minacis Andreo, per raŭka voĉo.

Sekve, dum Mavomo kaj Roza gardis la indiĝenon, Andreo kaj Hua direktis sin al la domo. Ili alproksimiĝis kun granda



zorgo, ĉar ili estis certaj, ke tie ili trovos la aliajn rabistojn. Tamen ili havis surprizon. Kiam Andreo rigardis tra la fenestro, li vidis Erikon kuŝantan sur hamako, kun la brakoj pendantaj malsupren.

La pordoj estis ŝlositaj, kaj ŝajne neniu pli estis en la domo.

— Eriko! Eriko! — vokis Andreo, frapante la fenestron.

Eriko ne respondis. Li restis tute senmova.


— Li ne reagis, Hua. Ŝajnas, ke li estas...

— Ne povas esti... — diris Hua, tre afliktita. — Ni rompu la pordon.

Tiam ili trovis trunkon apud la domo kaj sukcesis per ĝi faligi la pordon, post multaj batoj. La pordo falis kun granda bruoj.

Eriko stariĝis per salto. — Kio okazas? — li kriis.

— Eriko! Ĉu vi bonfartas? — diris samtempe Andreo kaj Hua, dum ili kuris kun ĝojo por brakumi la amikon.



— Jes, mi ne povas eliri, sed mi bonfartas. Kia surprizo! Kiel vi trovis min?

— Baldaŭ ni rakontos ĉion al vi, — diris Andreo. — Unue ni aŭdu kion tiu juna kaj mistera indiĝeno havas por diri.



MITARO RIVELAS LA SEKRETON DE LA TOTEMOJ

Dum ili revenis al la kamioneto, Hua komentis:

— Ĉio, kio okazis ĝis nun, estas tre stranga. Ŝajnas al mi, ke li estas bona junulo.

— Ankaŭ mi pensas tiel, — diris Eriko. — Mi ne komprenas, kial li alportis min al ĉi tiu domo. Dum la tuta tago mi nur manĝis, aŭdis muzikon kaj dormis.

— Kion li diris, kiam li alproksimiĝis al vi en la Observatorio? — demandis Andreo al Hua.

— Nenion. Li nur donis al mi ĉi tiun bileton — ŝi respondis, transdonante al Andreo la paperon, kiun li vidis de malproksime en la Observatorio.

Andreo prenis la bileton kun scivolo kaj legis ĝin laŭte:

— “Fraŭlino Hua, bonvolu akompani la portanton de tiu ĉi bileto. Por la bono via kaj de viaj amikoj, ne reagu.” — Ĝi estas subskribita: Oratim.

— Ĝi estas egala al tiu, kiun mi ricevis en la Kultura Centro, — diris Eriko. — Mi obeis kaj akompanis lin, ĉar mi pensis, ke li estas armita.

Mavomo kaj Roza sentis grandan ĝojon, kiam ili vidis Erikon.

Dum ili interparolis, la junulo faris senutilajn klopodojn por liberigi sin de la ŝnuroj. Post kelka tempo li komencis petegi:

— Liberigu min. Mi volas klarigi ĉion al vi.

Tiam la infanoj decidis demeti la tolon kiu kovris lin kaj

malligi liajn piedojn. Liaj manoj ankoraŭ restis malliberaj. Sekve ili ĉiuj eniris la domon kaj la indiĝeno klarigis la tutan misteron.

— Mia nomo estas Mitaro, — li komencis. — Mi apartenas al la nacio Bororo, fakte mi estas unu el la lastaj de tiu tribo, kiu estis multenombra en la pasinteco. Antaŭ multe da tempo, kelkaj blankaj viroj invadis nian teritorion por serĉi altvalorajn ŝtonojn. Niaj prauloj posedis multe da tiaj ŝtonoj, sed ili kolektis ilin nur por admiri ilian brilon.

— Unu el la blankuloj malkovris, ke multaj ŝtonoj estis tenataj en du totemoj, kaj en la unua oportuno li ŝtelis ilin.

— Tiuj totemoj — Tarumo kaj Nurana — estis sanktaj objektoj, simboloj de la vivo de la tribo. Granda malĝojo falis inter la indiĝenojn, kiam ili sciis pri la ŝtelo. La ŝamano, dum tranco, antaŭvidis la ruinigon de la tribo kaj pezan malbenon sur la blankajn homojn.

— Ni jam scias pri la malbeno, — diris Andreo. — Tamen ni ne komprenas, kial ĝi estas skribita en lingvo tiel ekzota.



— Estas simple, — respondis Mitaro —, sed antaŭ ol paroli pri tio, mi volas diri, ke la ŝamano estis certa pri la destino de la tribo. Baldaŭ aperis stranga malsano kaj la konataj herboj ne kuracis ĝin. La plimulto de la indiĝenoj mortis. Tiuj, kiuj supervivis, iom post iom disiĝis tra la lando.

— Post pli ol unu jarcento, unu el la posteuloj de la tribo retrovis Nuranan. Li rakontis la historion de la totemoj al sciencisto, kiu venis al Brazilo studi la indiĝenajn morojn, kaj petis lin skribi la vortojn de la ŝamano en lingvo malmulte konata. Li faris tion, ĉar ĝis tiam tiu historio pasis de patro al filo nur buŝe, kaj li timis, ke la historio perdiĝos kaj ne plu eblos nuligi la malbenon.

— Kaj nun mi atingas la punkton de via dubo, Andreo. Mia praulo ne volis uzi lingvon pli konatan por eviti, ke personoj sen skrupuloj sciu pri la malbeno kaj ne respektu ĝin.

— Do, — diris Andreo al la aliaj. — La afero estas klara nun. Mi pensas, ke ni devas malligi liajn manojn. Kiam li kunpuŝiĝis kun Mavomo en la busa stacidomo, li vidis la totemon kaj



decidis preni ĝin, por nuligi la malbenon. Poste okazis ĉio, kion ni jam scias.

— Mi ne opinias, ke ĉio estas klara, kiel vi diras — kontraŭstaris Roza, kiu ankoraŭ ne estis trankvila. — Kiel li eksciis, ke la totemo estis en via domo, Andreo?

Andreo petis pliajn klarigojn al Mitaro.

— Nu, — li diris —, ne pensu, ke la kunpuŝigo inter mi kaj Mavomo estis hazarda. Mi loĝas en San-Paŭlo kaj laboras en la flughaveno. Mi vidis la totemon tie, kiam Mavomo montris ĝin al la doganisto.

— Ekde kiam mi estis infano mi revas kunigi denove Tarumon kaj Nuranan. Se tio okazos, miaj gefratoj kredos, ke nia tribo estos denove granda, kaj la blankaj homoj povos vivi en paco, liberigitaj de la malbeno. Kiam mi vidis la totemon, en la flughaveno, mi ankoraŭ ne sciis, ĉu ĝi estis Tarumo. Tial mi sekvis Mavomon ĝis la stacidomo, kie mi ĵetiĝis kontraŭ li, por pli bone ekzameni la totemon. En tiu momento mi havis

certecon, ke tiu totemo estas Tarumo, kaj pro tio mi sekvis Mavomon ĝis ĉi tie. Mi vidis, ekzemple, kiam Andreo kaj Mavomo eniris taksion, tuj post la alveno de Mavomo.


Tiuj lastaj vortoj de Mitaro klarigis la dubon de Mavomo.

— Do tiu viro estis vi, — li diris. — Kiam mi vidis vin, mi ne kredis ke vi estas la sama persono, kiun mi renkontis en San-Paŭlo.

— Jes, — daŭrigis Mitaro. — Ne estis malfacile sekvi vin ĝis la domo de Andreo kaj reveni tien en la sekvanta tago por preni la totemon en lia ĉambro. Mi scias, ke vi demandos min pri la juvelujo. Fakte estis mi, kiu lasis ĝin tie. Mi volis montri, ke mi ne ŝtelis ion. Mi forportis objekton, kiu apartenas rajte al mia tribo, sed mi pensis, ke estas mia devo lasi ion en ĝia loko.

— Kaj kial vi elektis Huan kaj Erikon? — demandis Andreo.

— Bone, — respondis Mitaro, — de longe mi sciis, pro la vortoj de la ŝamano, ke mi bezonos skandinavon knabon kaj ĉinan knabinon.




— Pro tio vi venigis Erikon al ĉi tiu domo, — deduktis
Andreo. — Tamen mi ankoraŭ havas dubojn: Kiel vi malkovris
iliajn naciecojn kaj nomojn? Kaj kiel vi sukcesis skribi tiun
bileton en la internacia lingvo?

— Ankaŭ tio estis facila, — klarigis Mitaro. — Mi iris al la
Universitato kaj petis helpon de brazila kongresano. Mi diris al
li, ke mi volas fari ŝercon al amiko, kiu scias la internacian
lingvon. Li tradukis la tekston kaj ankaŭ havigis al mi liston de
ĉiuj kongresanoj, kun la datumoj, kiujn mi bezonis.

— Post la kupto de Eriko, mankis al vi nur Hua, —
konkludis Andreo. — Kiam vi iris al la Observatorio por forpreni
ŝin, vi ne suspektis, ke ni jam malkovris ĉion. Kaj jen ni ĉi tie.

— Mi ankoraŭ havas grandan dubon, — diris Hua, kiu ĝis
tiam restis en silento. — Demandu lin, Andreo, kial li ne parolis
kun ni antaŭe, anstataŭ agi kun tiom da risko?

Kiam Mitaro aŭdis pere de Andreo la demandon de Hua, li
mallevis la kapon. Li hontis.



— Nun mi scias, ke mi eraris. Vi estas tre bonkoraj. Verdire mi pensis multe antaŭ ol agi, kiel mi agis. Du fortoj luktis interne de mi: en unu flanko estis la forto, kiu konsilis min kredi je la blankaj homoj, ĉar nia diferenco estas nur la koloro de la haŭto; en alia flanko estis la forto, kiu diris al mi, ke mi ne devas fidi la blankajn homojn, ĉar ili forprenis kaj ankoraŭ forprenas la vivon de mia popolo. Bedaŭrinde la dua forto venkis. Mi kaŭzis al vi aflikton, malĝojon, eble eĉ timon. Vi ne meritas tion. Nun ĉio estas perdita. Mi iros kun vi en la policejon kaj rakontos, ke mi ŝtelis la totemon kaj rabis Erikon kaj Huan. Mi esperas, ke unu tagon vi pardonu min.

Kiam Mitaro finis sian paroladon, la kvin amikoj foriris por interparoli en alia ĉambro. Post kelkaj minutoj ili revenis kaj Andreo alparolis Mitaron, kun serioza mieno:

— Mitaro, ĉu Ari ripozos morgaŭ vespere?

Mitaro levis la malsekajn okulojn kaj respondis, per malforta voĉo:



— Jes, morgaŭ estos nokto de nova luno.

— Bonege! — diris Andreo. — Do revenu ĉi tien kaj ne forgesu kunporti Tarumon kaj Nuranan, por ke ili kisu unu la alian. Hodiaŭ jam estas tre malfrue.

ADIAŬO

En la sekva nokto okazis la rito de la sankta kiso. Torĉoj anstataŭis Ari kaj Meri. Eriko kaj Hua eniris kun Tarumo kaj Nurana en siaj brakoj. Mitaro eldiris vortojn en la lingvo de sia popolo kaj komencis bati tamburon. Je tiu ploriga sono, Tarumo kaj Nurana kuntuŝiĝis por la sankta kiso.

Mitaro estis feliĉega. Roza ploris mallaŭte.

Estis multaj brakumoj kiam ĉio finiĝis. Andreo petis la atenton de ĉiuj kaj parolis:



— Mitaro, ĉiuj ni partoprenas en via ĝojo. Roza, Hua, Mavomo, Eriko kaj mi reprezentas ĉi tie la kvin kontinentojn. Kune kun vi ni reprezentas ankaŭ ĉiujn rasojn. Kaj ni ĉirkaŭprenas kaj komprenas unu la aliajn, kiel egaluloj. Tio estas afero tre grava. Neniam ni forgesos ĉi tiun nokton.

Tiam Andreo redonis al Mitaro la juvelujon.


Mitaro dankis, prenis la keston kaj eltiris el ĝi kelkajn ŝtonojn.

— Akceptu almenaŭ ĉi tiun donacon, — li diris, donante al ili po unu ŝtono. — Ili estas smeraldoj. Ilia koloro signifas por vi esperon, ĉu ne?

— Jes, la verdo de la espero, — respondis Andreo. — Dankon, Mitaro.

Ankaŭ la aliaj dankis, emociitaj.

* * *



Mitaro veturigis ilin en sia malnova kamioneto ĝis la Universitato. Tie ili brakumis unu la aliajn je la lasta fojo.

— Adiaŭ, Mitaro!

— Adiaŭ, amikoj!

Ili adiaŭis per la mano ĝis la kamioneto malaperis post la unua stratangulo.

— Nur unu afero ne estas klara, — diris Mavomo. — Kial ĝuste tiu statueto logis min en la Muzeo, inter tiom da objektoj?


— Fakte! — konsentis Roza. — Kaj vi ankaŭ antaŭsentis, ke Eriko bonfartas.

— Misteroj, misteroj — diris Andreo, ridante. — Ni jam solvis tro da ili. Tiujn novajn misterojn eĉ Hua ne kapablas solvi.

— Bone, miaj amikoj, — diris Hua, kaŝante oscedon —, por mi la kazo estas finita. Ni iru dormi, ĉar ni havas ankoraŭ du tagojn de kongreso. Ĝis morgaŭ.

— Ĝis morgaŭ, Hua.

Baldaŭ ĉiuj ili estis survoje. Foje ili metis la manon en la poŝon por vidi ĉu la smeraldo ankoraŭ estas tie.





J. M. PROGIANTE



Mi komencis rakonti historiojn kiam miaj gefiloj estis infanoj, ĉar ili ne dormis se mi ne faris tion.

Preskaŭ ĉiutage mi legis aŭ kreis fabelojn plenajn da danĝeroj kaj misteroj. Ili aŭdis min atente, petis ripeton kaj verŝajne songĝis pri herooj kaj aventuroj.

Unu tagon naskiĝis ĉi tiu rakonto, pri Tarumo kaj Nurana, kiun ili tiel ŝatis, ke mi decidis skribi kaj konigi al ĉiuj.



Kvin infanoj el malsamaj kontinentoj renkontiĝas en Brazilo okaze de kongreso de la internacia lingvo.

Ili pretervole implikiĝas en aventuron kiu komenciĝis antaŭ jarcentoj, kiam du totemoj estis ŝtelitaj el indiĝena tribo kaj el tio naskiĝis terura malbeno.

“Blankhaŭta viro forportis hodiaŭ la vivon de nia tribo. Kune kun ĝi, li kunportis sian propran malbenon, kiu daŭros ĝis la sekvanta kiso de Tarumo kaj Nurana.”

